# *La kuba parlamento sesios eksterordinare por analizi gvidajn dokumentojn por la estontenco.*



Havano, 29 maj (RHK) La ?tata konsilantaro de Kubo, kongrue al tio priskribita en la artikoloj 78  kaj 90 de la Konstitucio, decidis okazigi eksterordinaran sesion de la nacia asembleo, la venontan unuan de junio en la Kongresa Palaco de Havano kun la celo analizi gravajn dokumentojn.

Temas pri la Konceptigo de la ekonomia kaj socia modelo kuba por socialista evoluo kaj la Gvidlinioj de la politiko de la komunista partio kaj la Revolucio por la periodo 2016-2021.

Aliflanke, oni informos pri la Bazoj de la p lano de ekonomia kaj socia evoluo ?is la jaro 2030: Vizio de la Nacio, Aksoj kaj Strategiaj Sektoroj.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/131020-la-kuba-parlamento-sesios-eksterordinare-por-analizi-gvidajn-dokumentojn-por-la-estontenco

# Radio Habana Cuba